Bulteno de la

# Londona Esperanto-Klubo

2018 majo-junio

## Kluba Programo:

### majo

**4** Diskuto kun Liven Dek – ĉe IBIS (Aldgate East)

**11** 1800h *Konsilantara diskuto*, malfermita al ĉiuj membroj, pri agado de la klubo en la posta periodo

1915h - *Lingva Seminario* (John Wells)–ĉe DIORAMA

**18** Literatura vespero – ĉe IBIS (Aldgate East)

**25** 18:00 Ariel kaj Saŝa : *Junularaj Aranĝoj, aktivado en JEB kaj en Esperantujo.*

19:15 *Gastprelego* de John Wells, Honora Prezidanto de LEK (Diorama)

### junio

**1** Literatura vespero – ĉe IBIS (Aldgate East)

**8** Eric Lee **-**'*La eksperimento*' (Diorama) (1800h Konsilantaro)

**15** Literatura vespero – ĉe IBIS (Aldgate East)

**22** Promen-ekskurso. *Se pro malbona vetero la promen-ekskurso ne povos okazi la 22an de junio, okazos tiam diskut-vespero ĉe Ibis(Aldgate East). Tiaokaze la promen-ekskurso okazos en la 29a de junio, se taŭgos tiama vespero.*

**29** Enigmo - ĉe IBIS (Aldgate East) *(alternative dato por ekskurso – vidu junio 22 ĉi-supre!*)

**julio**

**6** Prilingva diskuto– ĉe IBIS (Aldgate East)

## Esperanta Kalendaro:

15 – 17 junio 2018: 113a Skota Esperanto-Kongreso, Royal George Hotel, Tay Street, Perth
skotlando.org/index.php/congress-general

28 jul – 4 aŭg 2018: 103a Universala Kongreso de Esperanto – Lisbono, Portugalio
http://uea.org/kongresoj

Vidu www.eventoj.hu/kalendaro.htm por ampleksa listo de renkontiĝoj.

*Bonvolu sendi informojn al la bultenisto antaŭ 11a de junio por mencio en la sekva Kluba Bulteno*



**Profesoro John Wells**

**estas nia novelektita Honora Prezidanto.**

**Li faros Gastprelegon la 25an de majo.**

## Anoj de LEK ĉe Kongreso en Aberystwyth

De la 13a ĝis laj 16a de aprilo ĉi-jara okazis en Aberystwyth tiel-nomata *Brita kaj Tutkelta Kongreso de Esperanto.* Inter la kongresanoj ne mankis membroj de Londona Esperanto-Klubo. Laŭ nekonfirmita takso tiuj nombris almenaŭ ok, el kiuj tri aparte menciindas. En la kongresa program-folio troviĝis anonco ke **Chris Lewis** prezentos *Ateliero(n) pri la vorteto 'si';* per vigla interveno **Marteno Miniĥ** informis kongresanojn pri internacie agnoskataj KER-(t.e. **K**omuna **E**ŭropa **R**eferenc-kadro) ekzamenoj, okazintaj kaj okazontaj en Londono kaj aliloke; kaj **D-ro Laura Miller**, kiu mem ne ĉeestis en Aberystwyth (sed kun kiu oni povas iom konatiĝi per longa intervjuo aperinta in numero 984 de *La Brita Esperantisto*) elektiĝis kiel Kuratoro (t.e. estrarano) de EAB. Ĉiujn tri ni varme gratulas!

## Pri nia Gastpreleganto Eric Lee (8a de junio)



Eric Lee, kiu naskiĝis en Usono, estas sindikatulo, verkisto kaj kreisto de retejoj. Li fondis kaj redaktas LabourStart, interreta novaĵ-rimedo por la sindikata movado. Li verkis *The Labour Movement and the Internet: The New Internationalism*. (Labor-movado kaj Interreto: La Nova Internaciismo)


## Promen-ekskurseto tra Kensington Gardens

22-a de Junio se sufiĉe bona vetero 19.15 (Lancaster Gate)

Se pluvos, aŭ se meteologoj estos tiutage prognozintaj daŭran kaj/aŭ fortan pluvon, okazos anstataŭe neformala kunveno en Hotelo Ibis. En okazo duba, bonvolu unue informiĝi telefone ĉe 07541 413989

(aliel la 29-a de Junio 19.15 - anstataŭ la kunveno en Hotelo Ibis)

19.15: Renkontiĝu ĉe la benkoj je la orienta flanko de La Fontanoj apud la enirejo Marlborough Gate (proksime al stacio Lancaster Gate - Busoj 46, 94, 148, 274, 390). Tie troviĝas benkoj. Proksime estas kafejo, kaj necesejo (sendube ne senpagaj).




Malĝustas la enirejo Lancaster Gate.
La promeno finiĝos ĉe Black Lion Gate (Busoj 70, 94, 148, 390) apud la stacio Queensway kaj proksime al stacio Bayswater.

# Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj: Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street, NW1 3FE (por kunveno kun programo);




Ibis Hotel, 5 Commercial St, London E1 6BF (renkontiĝu en la vestiblo por diskutvespero)




Kutima programo ĉe Dioramo:

18:00 lingvokurso(j) kaj/aŭ konsilantarkunsido

19:15 – 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 – 20:45 paŭzo

20:45 – 22:00 diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero

22:00 fino

Dioramo: Metrostacio: Warren St (linioj "Victoria", "Northern"), Euston Square ( "Hammersmith & City", "Circle"), Regents Park ("Bakerloo").

Fervojo *London Overground*: Euston

Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205, 390, 453, C2.

Ibis (Shoreditch): Metrostacio: Aldgate East – uzu la eliron nro 2 (Toynbee Hall); (linioj "Hammersmith & City", "District"); Aldgate (linioj "Circle" "Metropolitan").

Busoj: 15, 25, 67, 115, 135, 205, 254.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:
http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm

---

Lokaj grupoj: Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346 rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: GregoryPorilo 020-8672 8095 aŭ esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

(La grupo en Kingston bedaŭrinde ĉesis kunveni, sed ĝia iama Sekretario Roy Cliffe (020-8397 5895) respondus demandojn kaj konsilus pri Esperanto.)

Federacioj: Orienta: Roy Threadgold - 01371 850481 aŭ roy@boydellsdairy.co.uk ; Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.

## Mesaĝo de la Konsilantaro

*Pro neatendita okupiĝo, la Prezidanto ne povas fari sian normalan leteron por ĉi-tiu bulteno.*

Dum la jarkunsido en marto okazis kelkaj ŝanĝoj.

Ni, kun granda plezuro, anoncas ke Profesoro John Wells estis novelektita kiel Honora Prezidanto de la klubo.

**Profesoro John Wells** estis prezidanto de la klubo dum entute dek ok jaroj, prezidis la Lokan Kongres-Komitaton de la Brajtona Universala Kongreso, kaj grave rolis en multaj aliaj facetoj de la klubo (ekzemple gvidis Lingvajn Seminariojn). Li laboris kiel prezidanto de UEA dum ses jaroj, kaj kiel prezidanto de EAB dum naŭ jaroj. Li estis membro de la Akademio de Esperanto de 1970 ĝis nun.

Elektiĝis kiel Honoraj Vicprezidantoj Heleno Prent kaj (nove) Joyce Bunting.

**Joyce Bunting** estis fidela membro de la klubo dum jardekoj, kaj longe laboris kiel kasisto de EAB, ĝis lastatempa emeritiĝo.

Aliaj elektoj estis:

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Renato Corsetti, Roland England, Chris Lewis, Terry Page, Antony Rawlinson (Bultenisto).

*La Konsilantaro*

---

## Sotono invitas (interalie) londonanojn !




Multaj partoprenantoj en ĉi-jara Brita kaj Tutkelta Esperanto Kongreso, inkluzive anojn de LEK, ricevis de membro de la Sotona (anglalingve Southampton) Esperanto-Grupo jenan buntan invit-karteton. Kvankam ĝi troviĝas proks. 120 km for de Londono, tamen Sotonon oni povas rapide aliri per trajno. Fojfoje LEK kun ĝojo bonvenigas vizitantan SEG-anon – ja estus tre agrable tion reciproki!

---

**Kiel kontakti LEK-Konsilantojn:**

Prezidanto/Sekretario (David Thornell) lek.sekretario@gmail.com

Kasisto (Arturo Prent) 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ aŭ ap_esp-lek21@yahoo.co.uk

Bultenisto (Antony Rawlinson) 5 Thorpe Crescent E17 5BY aŭ acj.rawlinson@ntlworld.com

Registristo (Anica Page) 7 Hampton, Great Holm,Milton Keynes MK8 9EP aŭ anica_page@btinternet.com